

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protaktantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
Gili Noriá, komercisto, Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto, București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-direktoro, Kaunas.

N-o 158
23. 9. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
Zanoni (literaturo)
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza postadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldona al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Eĥo de l' Dekkvina.

Unu fojon en ĉiu jaro la Esperantistaro de la tuta mondo kunvenas en la Universala Kongreso de Esperanto. Ĉiufoje la atento de ĉiuj adeptoj de Esperanto direktiĝas al ĝia preparo, al ĝiaj aliĝoj kaj progresoj. Kaj grave. La mondkongreso estas la kulminacia punkto de nia tutmonda propagando. Kvazaŭ parado ĝi ebligas bonan super-rigardon pri la amplekso de nia movado kaj pri la praktikaj progresoj faritaj.

Niaj mondkongresoj perdis la karakterizaĵojn de l' dilettantismo. Jam de longe ili estas valoraj demonstracioj, iom post iom foriĝis de ili la nure organiza karaktero. Ili estas manifestacioj de grava, serioza movado praktika, kies kulturajn signifon preskaŭ neniu plu kuraĝas nei. La nekredemuloj silentas. La mokantoj fariĝas senkuraĝaj. La skeptikuloj malpliĝas. La anaro fariĝas pli granda. La fervoro intensiĝas. La movado progresas. Ĝi antaŭenmarŝas senhalte sur la vojo al la fina venko.

Malfrankvilon ekkaptas ĉiun dum la kongresa tempo. Nervece oni rapidegas al la kongresurbo. La intereso koncentriĝas je la laboraj farotoj. Granda amaso da homoj, iel celantaj utiligi Esperanton. Mondfestoj oni nomis la kongresojn; kvankam la reala emo pri praktika laboro pli fortiĝas, ilia efiko estas festa. Homoj de plej diversaj nacioj reunuiĝas por komuna laboro. Unu penso sole influas ilin: kunhelpi al la progreso de tiu ĉi grava movado. Pro tio sole unu sentimento kaj pro tio la festa impresio.

Laboremaj, diligentaj manoj preparas la kongresojn. Tagon post tago, ja eĉ nokte, fervoraj gesamideanoj febre klopodadas sukcesigi ilin. Sole malmultaj personoj scias, kiu kolosa laboro estas necesa por aranĝi tiajn kongresojn.

La Dekkvina pasis. La gesamideanoj helmeniris. Entuziasme. Plene da nova fervoro. Ili rekomencas sian helman laboron. Daŭrigas akceli Esperanton, forigitaĵ per la ekzemplo. Jam okupas ilin la venontjara mondkongreso. Helpi ankaŭ al ĝia sukceso estas ilia nova celo. Pri la pena laboro por la ĵus okazinta kongreso plu neniu memoras. La homa spirito ja ĉiam rapidas antaŭen. Senhalte.

Estas la tasko de l' kronikisto eternigi la okazantaĵojn.

Tiel li ankaŭ enskribas en la libron de la historio de Esperanto la danko-suldon de la Esperantistaro al ĉiuj bravaj samideanoj de Nürnberg, kiuj kuraĝe entreprenis la organizon de tiu ĉi granda manifestacio. Li substrekas la nomojn de la estraranoj kaj fakestroj, direktintaj la laborojn. Li laŭdas la meritojn de l' kongresa prezidanto, preninta sur sin tian grandan respondecon.

Li foliumas al nova paĝo. Al la fino de la antaŭa tamen li skribas tion, kion disvastigis la juĝo de miloj da gesamideanoj en la gazetaro, tion, kio estas la rekomenco al la kuraĝaj pioniroj, tion, kio devas interne kontentigi kaj ĝojigi ilin.

La Dekkvina estis unika sukceso!

La eĥo de l' kongreso pravigas lin.

Robert Kreuz.

XV-a Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg.

Postkongresa Cirkulero.

1. Kongresofitizo. Laŭ la aliĝilo repago ne povas okazi, escepte al francaj kaj belgaj samideanoj, kiuj rajtas apartan arangan.

2. Kongresdokumentoj. Al ĉiuj aliĝintoj, kiuj ne povis partopreni, laieble ni sendis aŭ sendos laŭdeziro kongreson kun kongreslibron kun kongresprogramo kaj urbojplano, atendante minimume repagon de la sendokostoj (1/2 svfr.). Nealiĝintoj ricevas la dokumentojn kontraŭ alsendo de 2 1/2 svfr. Adresaro kaj Zamenhofaltero kostas 1 svfr., 4 kongresurbaj gravuraj 1/2 svfr., 5 diversaj

oficialaj kongreskartoj 10 ct. (inkl. poŝtelspezoj). Ĉio pagota en egalvaloraj monbiletoj.

3. Kongresfotografajoj estas haveblaj senpere ĉe la firmo Bischof & Broel, Nürnberg, Bayreutherstr., grandformataj bildoj el la kongresgardeno kaj ĉe la Dürrer-monumento po 1/2 dolaro, malpligranda bildoj pri ekskurso al Schmausenbuk 1/4 dol., poŝtkarta formato po 1/8 dol., germanoj pagas la duonon. Aliaj tre belaj bildoj (feste flagita stacidomo, estraro, delegitoj) estas mendeblaj ĉe Fotoaktuell, Berlin C 19, Geydelstr. 2, kongresbarenda bildoj ĉe Literatura Mondo, Budapest VI, Andrassy-ut 81.

4. Korespondajoj. Postlasitajn sendaĵojn kaj korespondajojn ni laieble poŝtendis al la hejmurba adreso. Kelkaj, pro manko de ĉia adreso, estis bedaŭrinde neplenumblaj.

5. Presaĵoj. Ni petas afablan transsendon de ĉiuj en- kaj eksterlande aperintaj kongresartikoloj. La rilataj lokaj kongresgazetoj estas tute elĉerpitaj kaj ne plu haveblaj.

6. Protokoloj. Mankas ankoraŭ diversaj protokoloj pri gravaj fakunsidoj. Ni petas baldaŭnan publikigon en nia oficiala kongresorgano aŭ senperan transsendon al Centra Oficejo, Paris, rue de Clichy 51.

7. Danko. Fine ni dankas ĉiujn, kiuj bonvole per konsilo aŭ fero apogis nin en nia malfacila laboro, speciale la delegitojn, oratorojn, gvidintojn de la fakunsidoj, prezidintojn, artistojn kaj la ofereman eldoniston de la kongresgazeto.

La XV-a estas vivinta, vivu la XVI-a!

Represo petata. Loka Kongresa Komitato
D-ro Ledermann.

En la Kongreslibro de Nürnberg troviĝas kelkaj raportoj de niaj oficialaj institucioj. Ni juĝas utila la diskonigon al ĉiuj Esperantistoj, ankaŭ ne-kongresanoj, kaj pro tio represas hodiaŭ unu el ili. La dua sekvos en proksima numero.

Raporto

de la Prezidanto de la Akademio kaj Lingva Komitato. Junio 1923.

Ĉar multaj Esperantistoj ne klare komprenis la rilatojn inter la Akademio kaj la „Sekcio pri scienco kaj teknika Vortaro“, kiujn mi jam alcelis en mia lasta jara raporto, ŝajnas utile, publikigi tie ĉi, kun nia respondo kiel Prezidanto de la Akademio, la leteron de s-o Rollet de l'Isle, per kiu, akceptante la direktorecon de la dirita sekcio, li petas kelkajn klarigojn:

Jen lia letero:

Paris, 4. febr. 1922.

Altestimata Prezidanto!

Respondante vian ŝatatan leteron, kiun mi ĵus ricevis, mi havas la honoron sciigi vin, ke mi volonte akceptas la taskon, kiun la Akademio donas al mi, kaj kiu konsistas en tio, organizi kaj direkti sub la kontrolo de tiu Akademio la laborojn de la Sekcio pri scienco kaj teknika Vortaro.

Mi estas grande korusita pro la maniero, laŭ kiu la Akademio elektis min, kaj mi petas vin, konigi al ĝi miajn plej korajn dankojn pro tiu pruvo de konfido. Mi faros mian ebion, por ke la Akademio ne bedaŭros pro sia ideo. Felice mi sukcesis, ricevi de s-o Rousseau promeson de kunlaborado: vi konas lin kompetentecan kaj laboremon, kaj tio multe tranĉas min pri la plenumado de la efektiva tasko. Tamen antaŭ ol komenci nian laboradon, mi dezirus ricevi de vi sekvanajn sciigojn:

1. Kiamaniere efektiviĝos la antaŭvidita kontrolo de la Akademio?
2. Ĉu ĝi koncernas la organizadon kaj funkciadon de la Sekcio?
3. Ĉu ĝi koncernas nur la lingvajn demandojn?
4. Ĉu la programo de laboro, kiun mi sendis al vi antaŭ kelkaj semajnoj, devas esti aprobita de la Akademio antaŭ ol mi aplikos ĝin?
5. Ĉu la Akademio intencas, ekzameni la novajn afliksojn kaj vortojn, proponatajn antaŭ ol ili estos akceptataj de la Sekcio kiel provizore kaj prove uzataj?

Mi estas feliĉa, se vi bonvolus sciigi min pri tiuj gravaj demandoj, kiuj laŭ mia opinio devas esti solvitaj, antaŭ ol ni komencos nian taskon.

Bonvolu, altestimata Prezidanto, ricevi la esprimon de miaj plej afablaj sentoj!

Rollet de l'Isle.

S-o Rollet de l'Isle la akademianoj elektis minuvice post la eksigo de D-ro Correl.

Jen mia respondo:

Paris, 10. febr. 1922.

Tre estimata s-o Rollet de l'Isle,

ke vi akceptis la malfacilan taskon, organizi kaj direkti la laborojn de la kreata Sekcio por starigo de sciencaj kaj teknikaj Vortaroj, ĉiuj akademianoj estas al vi tre dankaj. Via agemo kaj kompetenteco estas por ili garantio de sukceso.

Jen miaj respondoj al viaj demandoj:

1. Kontrolo: Kiam la sekcio por scienco kaj teknika vortaro opinios, ke scienco aŭ teknika terminaro estas, post sufiĉe longa provado, tute preta por Akademia oficialigo, tiu sekcio submetos ĝin al la Akademio, kiu, konstatainte, ke ĝi nenion entenas, kio estas kontraŭa al la lingvo, kiun donis al ni D-ro Zamehuf en sia Fundamento, donos al ĝi sian aprobon.

2. Tute ne. Vi estas plene libera, organizi vian sekcion, kiel ŝajnas al vi plej utile kaj praktike, kaj elektu en ĝin la Esperantistojn lingvo-komitatojn aŭ ne — kiujn vi opinios plej kompetentajn en la diversaj fakoj.

3. Jes.

4. Jes; via libereco estas plena.

5. Ne. Diskutu, studu, prove uzu ilin unue inter vi sciencitoj. (Vidu respondon 1-an.) Via tre kore.

Th. Carr.

Pluaj klaŭzoj ne ŝajnas necesaj.

La rezultato de la voĉdonado a) pri landnomoj, b) pri la kreado de akademijaj korespondantoj, mi jam konis proksimume pasintajn jaron. La definitiva regulado (cirkulero al la L. K-anoj de la 5. nov. 1922) estis jena: Pri landnomoj: 87 L. K-anoj voĉdonis; 74 (2 kun rezervoj) aprobis la fidelajn sintenadojn de la Akademio en la landnoma demando (finajo u); 5 ne aprobis, 2 voĉdonoj estas dubaj, 6 sin detenis de voĉdono; c) pri Akademijaj Korespondantoj. 87 L. K-anoj voĉdonis: 80 (8 kondiĉe, ke ili estu L. K-anoj) aprobis, 1 ne aprobis, 6 sin detenis de voĉdono. Sekve al nia Regularo estis aldonata jena paraĝo XII 21b:

2. La Akademio havas la rajton, elektu eĉ ekster la L. K. se bezone, akademian korespondantojn, — se ili ne estas jam L. K-anoj, la Akademio petos de la L. K. aprobon, dank' al kiu ili fariĝos L. K-anoj. — Ila nombro ne devas superi la trionon de la nombro de la Akademianoj.

Post la apero de la franca kaj angla partoj de la „Korekto de la eraraj tradukoj en U.V.“ aperis en la vintro 1922/23 la germana parto. La pola kaj rusa partoj por diversaj cirkonstancoj ne ankoraŭ povis aperi, sed aperos antaŭ la fino de l'jaro. Ĉiuj partoj estas aŭ estos litografie presitaj; ili do estas kvazaŭ antaŭlaboraĵoj, submetita al ĝenerala ekzameno, post kiu ili estos presitaj tipografie en difinita (kun Esperanto) seslingva eldono.

La plena „Vortaro de oficialaj Radikoj de Esperanto“ (kun la tri aldonoj) aperis nun tipografie presita.

Ŝajnas saĝe, atendi kelkajn jarojn antaŭ ol eldoni kvaran eldonon.

1. Ĉar novan tradukon de la „Komuna Vortaro“ (la sciencan kaj teknikan) ni tute ne celas tie ĉi. Ili ja havas kaj devas havi specialajn privilegiojn la L. K. devas oficialigi nur kiam ĝi jam estos sufiĉe ĝenerale uzata. Tro da severece estas sur tiu ĉi kampo malpli danĝera ol la malo.

2. Ĉar, kvankam malpli grave sed praktike konsiderinde, ni ne rajtas senkuraĝigi la eldonistojn, kies helpo nia movado nepre bezonas, per tro rapida malaprobo de iliaj eldonoj. En ĉiuj rilatoj, propagandaj kiel komercaj, nia lingvo devos posedi ian firmecon — kaj tio tute ne signifas, ke ĝi ŝtoniĝos.

La Akademio, kiu aŭskultos ĉiujn kritikojn, eĉ kiam ne faritajn laŭ la deziro (kiun ĝi rajtus postuli) helpi al ĝia laboro, ekzamenos la demandon, ĉu utile estas, liksi ian templimon inter la eldonoj de la Oficialaj Aldonoj (ekz. 5 ĝis 10 jaro).

La uzantoj cetere, ne la vortaristoj faras lingvon; sed la konstato de la ĝenerala uzado estas aliparta afero. Ĉiu opinias, ke la de li

uzata vorto estas jam aŭ estos baldaŭ internacie akceptita. La taskon elektii, akcepti aŭ malakcepti, malpli faciligas ankoraŭ la fakto, ke ne buŝe, sed nur skribe estas ebla la diskutado inter Akademianoj, loĝantaj en landoj malproksimaj unu de la alia.

Oni rajtas esperi, ke la starigo de fakaj komisionoj kaj subkomisionoj, pri kiuj parolas Prof. Grosjean-Maupin en sia raporto, por la ne tro multnombro de iliaj membroj, faciligos la laboron. (Tiuj komisionoj konsistos, se la Akademio tion aprobas, el la Direktoro de ĉiu Sekcio, por lia sekcio, el 2 akademianoj kaj 2 L. K-anoj, kiujn elektos la direktoro mem.)

La sekcio rajtos starigi subkomisionojn ĉu naciajn, ĉu fakajn interkonsentante kun la estraro de la Akademio. Ĉar grava estas la respondeco de la direktoroj, granda devas esti ilia libereco en la elekto de kunlaborantoj.

Certe ne ĉio estas perfekta en nia antaŭa kaj nuna labororganizo, sed perfektebla ĝi estas, kaj, se anstataŭ detruai aŭ subfosii la konfidon per akraj riproĉoj, samideana spirito bonvolos helpi, iom post iom la lingvaj institucioj plibonigos siajn labormetodojn por la bono de Esperanto.

Al la uzantoj, kiel jam dirite kaj laŭ la intenco de D-ro Zamenhof, apartenas la rajto fari la lingvon; sed neniam la uzantoj estos tro singardemaj en la enkonduko de novaj radikoj aŭ formoj. La kreado de nova vorto estas permesata nur, kiam, post atenta esploro de nia vortrezoro, iu konstatis, ke tute ne eble estas, esprimi alimaniere sian pensaron. Tia kreado por ĉiu neniam devus esti plezuraj, sed ĉiam ĉagreno. La malsana deziro ĉe kelkaj pliriĝigadi aŭ plibonigi la lingvon alportas al nia internacia komuna lingvo nenian profiton, kaj tro ofte kaj grave malhelpas nian propagandon: ne firmas, senĉese ŝanĝantan lingvon neniu volas lerni, al neniu ĝi estus utila. — Oni aŭskultu la konsilojn de l'direktoro por la komuna vortaro kaj sekvu ilin!

En junio (1923) aperis, eldonita de l'Centra Oficejo, la jarlibro de la lingvaj institucioj. Ĝi entenas:

1. La deklaron de la akademio (Dec. 1923).
 2. La planan Regularon de la L. K. kun komentario pri la dato kaj la diversaj balotadoj.
 3. La liston de la L. K-anoj laŭ alfabeto kun adreso, laŭlingve kaj laŭ eliraro de ĉiu.
 4. La liston de la akademianoj kun ilia eliraro.
- La L. K. (escepte por la rusaj membroj) estas nun plene reorganizita; ne dubu estas, ke se oni ĝin komparas kun la antaŭmilita, la proporcio inter la diversaj lingvoj estas nun — laŭ la deziro de la Akademio — pli justa ol antaŭe, kaj ke el Esperantlingva vidpunkto la kompetenteco de ĉiu estas, se ne ankoraŭ absoluta, tamen pli kontentiga ol ĝi estis en 1914.

En la Akademio mankas ankoraŭ nun reprezentanto por la rusa lingvo. Lian postenon ni rezervis, ĝis kiam niaj rilatoj kun Rusujo estos sufiĉe regulaj. La nuna Akademio akiris tre kompentajn novajn membrojn, kiuj alportas al ĝi kun sia bonvolo la altvalorajn aŭtariatan kaj kunlaboradan de ĉie ŝatataj samideanoj. Bedaŭrinde ĝi perdis dum la milito nian lertan poeton kaj tradukiston A. Grabowski kaj lastatempe D-ron Mybs, kies morto estis por ni ĉiuj granda doloro; multvaloraj estis ĉiam liaj diroj kaj lia opinio. Fidele ni konservas la memoron de tiuj du eminentaj kaj amitaj kunlaborantoj. S-o Wackrill ankaŭ ekŝiĝis; lia sano postulas ripozon, sed li ne rifuzos siajn konsilojn. Al li ni deziras tulkore plenan resaniĝon.

La estraron de la Akademio oni elektos por 2 jaroj (anstataŭ 3, ĉar novaj elektoj devas okazi en 1925) dum la Nürnberg-a kongreso aŭ tuj post la kongreso.

Ke en tiu ĉi grava reorganiza laboro la prezidanto — kiom da klopodoj, da leteroj, da tempo ktp. ĝi kofis, li sola scias, — estas ebla; sed la riproĉon, ke li agis ne korekte, ne laŭleĝe, li ne meritas. Malfacila estas la tasko, kiam naciaj aŭ fakaj societoj tute ne respondas la al ili senditajn leterojn. En ĉio kaj ĉie la prezidanto agis kun la sincera deziro esti justa kontraŭ ĉiu.

Malgraŭ la malfacilaĵoj de la nuna tempo, kiuj malpli faciligas kaj ofte malebligas la normalajn rilatojn inter la popoloj, ni kuraĝe rigardu antaŭen. La bezonoj pri internacia lingvo oni ĝenerale malpli sentas ol antaŭ la milito. Ĉiu vivas ja ĉe si. Sed pli helaj tagoj revenos... kiam, ni ne scias, sed certe ili venos. Ĝis tiam ni jaluze konservu internacian unuecon de Esperanto per neŝancela fideleco al la lingvo, kiun donis al ni D-ro Zamenhof, nia neforgesebla Majstro. Ni laboru senlace, ni semu kaj dissemu, kaj se la maljunuloj inter ni ne faros la rikolon, ĝin faros la pli junaj aŭ niaj filoj, ne por persona, ĉiam nova gloro, sed por la bono de l'homaro!

Th. Cart,
Prez. de la L. K. kaj de ĝia Akademio.

P.S. En la fino de tiu ĉi raporto dankon ni ŝuldas speciale al la gazeto „Esperanto Triumfonta“ kaj al la naciaj gazetoj, kiuj regule represis la cirkulerojn de la Akademio kaj penis zorge informi sian legantaron pri la decidoj kaj agado de la Lingvaj Institucioj.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scigilojn (sur poŝtarko aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraci aŭ privataj scigiloj) pri ĉiu novaĵo kaj la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Landoj.

Aŭstralio.

Melbourne. Dum julio okazis pluraj paroladoj de samideanoj el Melbourne en diversaj lokoj aŭstraliaj. Al la Filio en Camberwell de la A.N.A., al la kluboj por junaj viroj de la presbiteriana eklezio, al infanoj de la plej alta klaso kaj la ĝeinstruistaro de la Surrey Hill's State-lernejo, same kiel al rondo de Y.M.C.A. oni konigis Esperanton per paroladoj. Oni klopodadas forigi la fakton, ke en Aŭstralio ekzistas ankoraŭ tiom da personoj nenion sciantaj pri Esperanto.

Dargaville (Novzelando). Nova grupo kunvenas. Sekretario s-o Pope, Belgrave South.

Okazis propaganda aranĝo en Lockwood Hall. S-oj Pyke kaj Rawson montris multbildaron „Tra centra Eŭropo per Esperanto“, kiu vekis multan intereson pri la praktikeco de nia lingvo.

Azio.

Hindujo.

La Hindustania Esperanto Societo en Delhi, antaŭ ne-longe starigita, konsiderinde progresas. Oni anoncas la jaman aliĝon de pli ol 100 membroj el plej diversaj profesioj kaj partoj de la tuta lando. Oni klopodas starigi grupojn de ĝi en diversaj gravaj urboj. Prezidanto de la societo estas s-o Prof. Gopaly, lektoro de la universitato de Delhi. (Ni gratulas niajn hindajn amikojn por ilia fervoro. Red.)

Eŭropo.

Anglujo.

Federacio de Lancashire kaj Cheshire. La 61-a kvaron-jara konferenco de tiu ĉi federacio okazos dum oktobro en Bolton. La daton oni anoncos pli malfrue. Oni petas pri kion eble plej multombra vizito.

Aŭstrio.

Wien. En gravaj ŝtrajpintoj de Wien depost mal-longe deĵoras policistoj, kiuj havas diverslingvajn surskribojn sur siaj manikoj. Ili parolas Esperante, angle, itale, ruse, ukraine, ĉeĥe, slovane kaj servas kiel interpretistoj por fremduloj. — Imitinda novaranĝo al grand-urboj. H.J.

Germanujo.

Nürnberg. La 10. septembro okazis ĉefkunveno de la Esperanto-partio Nürnberg-Fürth. Prof. D-ro Ledermann paroladis pri la datigo de la kongreso kaj dankis al ĉiuj kunlaborintoj en la malfacila laboro. Aplatide la mult-nombra ĉeestantaro akceptis la detalan kaj interesan raporton. Ĉar, pro troa laceco, li demetis la prezidon, okazis novelektio kun jena rezulto: prez. fabrikanto Otto Pilhofer, vicprez. ĉefinstruisto L. Meyer, kas. komercisto M. Hönigsberger, 1-a sekr. Ann. Hirsch, 2-a sekr. J. Isner.

Nova grupo en Kreuznach (Nahe) kun 17 membroj. Aliĝis al la Germana Esperanto Asocio. Estraromembroj: prez. Oswald Weisser, kursgvidanto Karl Zorn, sekr. Oskar Scheid.

Hispanujo.

Barcelona. En la Escola del Treball de Barcelona, laborista teknika lernejo oficiale subtenata de la „Kongomuneco de Katalunujo“ s-o Jaume Grau Casas faris propagandan paroladon antaŭ 100 ĉeestantoj.

La Instituto de lernantoj de tiu lernejo organizas kurson de Esperanto baldaŭ komenciĝonta.

Hungarujo.

Eksterordinara ĝenerala kunveno en Budapeŝto. La 27. kaj 28. oktobro okazos eksterordinara ĝenerala kunveno de la Hungarlanda Esp. Societo en Budapeŝto por preparoli gravajn organizajn demandojn kaj samtempe aranĝi propagandofeston. Eksterlandaj samideanoj, kiuj samtempe deziras veni al Budapeŝto, sciigu tion antaŭe al la Societo, Socia Muzeo, Budapeŝto, VI., Eötvös u. 3.

Gazetaro.

- The Open Road, London, septembra kajero. Esperanto-anglo.
- Die Neue Zeitung, Wien, 31. 8. pri Esp.-parolado, 3. 9. pri Aŭstr. Katolika Ligo Esp., 8. 9. pri Aŭstr. Katol. Ligo Esp.
- De Transportarbeider, Antwerpen, septembra numero, pri Esp. kaj transportilaboroj.
- La Bulgarie (francilingva), Sofia, 15. 8. pri Nürnberg.
- A Idéa, Fortaleza-Ceara, 15. 8. Esp. en Brazilio. 6. 8. mencio de Esp. en politika revuo.
- Reichenberger Zeitung 7. 9. Esperanto kaj la hotelistaro.
- En Francujo raportis pri la Nürnberg-a kongreso: L'Indépendant de la Charente Inférieure, Saintes, 29. 8.; Le Progres de Saône et Loire, Chalon, 25. 8.; Le Bien Public, Dijon, 28. 7.; L'Ouest, Anger, 20. 8.; Le Petit Méridional, Montpellier, 24. 8.; L'Action Républicaine, Tulle, 28. 8.; Le Corrégien, Tulle, 25. 8.; Le Courrier de l'Allier, Moulins, 21. 8.
- Région du Centre, Clermont-Ferrand, publikigis en aŭgusta numero art. pri Venetia.
- L'Humanité, Paris, 6. 6. pri SAT-kongreso.
- L'Ere nouvelle, Paris, 6. 9. pri SAT-kongreso.
- La Vie Ouvrière, Paris, 31. 8. pri SAT-kongreso.
- La Publicitat (katalunlingva), Barcelona, 11. 8. pri Internikso de lingvoj kaj regionoj (el ET).
- L'Echo du Danube, 2. 8. pri sveda elmigrado. 8. 8. pri Kongreso en Nürnberg.
- Pester Lloyd, 9. 8. pri polica kongreso en Nürnberg. 16. 8. pri vizito de estonaj Esperantistoj.
- Az Est, 15. 8. pri vizito de estonaj Esperantistoj.
- Hir Szombathely, 9. 8. pri Nürnberg-a kongreso. 11. 8. pri Esp. festo kaj ekskurso.
- Közszeg és vidéke, Közszeg, 12. 8. Esp. festo kaj ekskurso.
- Hir Szombathely, 14. 8. pri Esp. festo kaj ekskurso.
- Magyarország, Budapest, 12. 8. pri Nürnberg-a kongreso.
- Világ, Budapest, 15. 8. pri Nürnberg-a kongreso.
- Pesti Napló, Budapest, 14. 8. pri Esp. kabaredo en Nürnberg.
- Pesti Napló, Magyarorszag, Budapest, 26. 8. pri biŭndia kongreso en Nürnberg.
- Somogyi Liszág, Kaposvár, 22. 8. pri studenta rondo Esp. Somogyi, Kaposvár, 25. 26. 8. pri studenta rondo Esp.
- Miskolczi Naplo, 11. 8. pri berna alferuvo laŭ Esp. spektanto kaj pri mondkatolika festo gazetara laŭ Esp. Katol. Mondo. 10. 8. pri sveda elmigrado.
- Reggeli Hirlap, Miskolcz, 9. 8. pri sveda ora mono kaj pri aero-poŝto amerika.
- Krome aperis en la hungara gazetaro de majo ĝis aŭgusto 65 similaj artikoloj.

- Pro familia, Milano. 2. 9. Ilustraĵo de Esp. Asocio de Verona Rigaische Rundschau, Riga, 18. 8. pri Nürnberg.
- Latvian Sargs, Riga, 2. kaj 5. 9. pri Nürnberg.
- Sozialdemokratis, Riga, 8. 9. Esp.-kroniko laborista. 12. 9. pri SAT ktp.
- Het Vaderland, s' Gravenhage, 12. 9. pri Esp. kurso anonco en Esp.
- Post-, Zoll- und Telegrafzeitung, Burgdorf, 6. 9. pri ILEPTO-agado.
- Oliner Tagblatt, Olten, 7. 8. kontraŭfark. de la redakcio. 8. 8. resp. de Esperantistoj. 31. 8. detala artikolo pri ILEPTO.
- New Jersey Post, Town of Union, N. Y., 18. 25. 8. pri Esp.

Socia Vivo.

Japanujo kaj la internaciaj laboraj konvencioj.

Rimarkinda progreso en Japanujo, rezulte el la labora leĝdono farigis en Japanujo, rezulte el la projektoj de konvencioj balotitaj en la diversaj kunsidoj de la Internacia Labora Konferenco.

Per leĝo de la 8-a de aprilo 1921 Japanujo efektivigis la Konvencion pri Senlaboreco, kiu enhavas kondiĉojn celantajn la starigon de sengagaj publikaj dungoficejoj.

Per la leĝo pri Dungigo de Maristoj de 1922, Japanujo efektivigis la konvencion, kiu ordonas la forigon de privataj pagataj dungagentejoj por maristoj kaj la starigon de publikaj dungoficejoj.

Per la Leĝo de aprilo 1921 malpermesanta la uzon de blanka fosforo en la manufakturo de alumetoj, Japanujo, sekvante la rekomendon balotitan de la Washingtona Kunsido de la Internacia Labora Konferenco, aliĝis al la internacia konvencio konsentita en Bern en 1906.

Laŭ informo antaŭ ne longe ricevita de la Internacia Labora Oficejo, la Japana Parlamento, en sia lasta kunsido, aprobis la jenajn tri gravajn Leĝojn:

1. Leĝon modifantan la leĝon pri Fabrikejoj;
2. Leĝon pri minimuma aĝo por industrialaj laboristoj;
3. Leĝon pri minimuma aĝo kaj sanatesto por maristoj.

La leĝo pri minimuma aĝo por industrialaj laboristoj respondas precize al la kondiĉoj de la Washingtona Konvencio pri minimuma aĝo por allasi infanojn al industria laboro, kaj la leĝo pri minimuma aĝo kaj sanatesto por maristoj respondas precize al la kondiĉoj de la Konvencio de Genova pri minimuma aĝo por allasi infanojn al marŝipa laboro kaj de la Konvencio de Genève pri la deviga kuracista ekzameno de infanoj kaj junuloj okupataj surŝipe. La Leĝo modifanta la Leĝon pri Fabrikejoj, kvankam ĝi ne precize respondas al la Washingtonaj Konvencioj, montras grandan progreson kompare kun la antaŭa leĝo. La nova leĝo, kune kun la leĝo pri sanasekuro de aprilo 1922, starigas ĝeneralajn principojn por la protekto de virinoj antaŭ kaj post akŭso, kaj ĝi ankaŭ ordonas la absolutan malpermeson de nokta laboro por virinoj kaj ĝejunuloj post tri jaroj de la dato de la efikiĝo de la leĝo. Detaloj pri la kondiĉoj de tiu ĉi leĝo aperas en Sociaj Informoj, la ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Labora Oficejo.

Internacia labora Oficejo.

Scienco.

Glaci-kosmogonio.

Sorto simila al tiu de nia majstro ŝajnas esti al la aŭtoro de la granda ideo, kiun enhavas tiu ĉi vorto. La sekvantaj linioj estas skribitaj ne por konvinki iun, sed por atentigi je la ideo glaci-kosmogonia, certe nekonata al multaj, precipe ne-germanoj. (Literaturo: „Hörbiger's Glacial-Kosmogonie“ von Ph. Fauth, Keiserslautern 1915. „Wirbelstürme, Hagelkatastrophen usw.“ v. Hörbiger; „Eis ein Weltenbaustoff“ v. Voigt kun kartaro [popular-science aranĝita], Paelel, Berlin, 1922.)

Granda estas la rolo de la akvo en la naturo, kiel estas konate al ĉiu. Tamen oni ne pensis ĝis nun, ke ĝi eble ankaŭ en la kosmo ludas pli gravan rolon. La Wien'a inĝeniero Hörbiger starigas tiun ĉi tezon. Li konstruis kune kun la germana astronomo Fauth tujan teorion, kiun ili nomis „Glaci-kosmogonio“. La ĉefaj punktoj de tiu ĉi teorio estas jenaj: En la kosmo estas H₂O pro la malalta temperaturo kompreneble kiel glacio. Ĉiuj korpoj moviĝantaj en la universo estas malhelpataj per la eter-media rezisto. Sekvo de tio estas eble, ke planedo fariĝas trabantoj.

Kiom da akvo estas sur la tero? Malmultege, se ni konsideras la proporciojn. La tuta surtera akvo formus, se ni ĝin egale disigus sur la tutan teron, nur eble 3 km altan mantelon. Pripensante, ke tiu ĉi akvo ne estas plimultigata de ekstere, ne ni povas klarigi al ni, ke ĝi ne malaperis dum tiom da jarmiloj per eniĝo en la teron, per kemia ligado en mineraloj, per kemia dissolvo en vulkanoj kaj posta forigo de l' hidrogeno. Do, tiel konkludas Hörbiger, la tero ricevas akvon ankaŭ de ekstere en formo de glacio. Tio ŝajnas nekredible, sed antaŭ kelkcent jaroj ŝajnis same nekredible, ke en la kosmo ekzistas fero, kion pravas la falegintaj meteoristoj. La ĥaĵo estas tia kosma glacio, kiu unue venas grandamase en la aeron kaj per la varmigiĝo parte fluidiĝas, parte dissolvigas ere. Precipe la tropaj pluvo-versoj kaŭziĝas el tio. Ĝis nun oni derivis la

tutan veteron nur de la vaporigo de tera akvo. Tio estas ĝusta, se oni ne ekskluzive kredas tion. Sed de kie venas la glacio? Vidu nokte ĉielon, kie la mistere brilanta „lakta vojo“ (galaksio) ĉirkaŭas kiel grandega ringo la tutan ĉielon. Ĝi estas nenio alia ol grandega rubando el pli-malpli grandaj glacipecoj. Meze de tiu ĉi ringo rapidas la tuta planeda sistemo tra la universo. Hörbiger nomas tiun glacirington „glaci-galaksio“ diferencigante de ĝi la „ardan galaksion“, kiu konsistas el multmiloj da brilantaj steloj. Per la media rezisto postrestas diversaj glacipecoj, kiuj tiel povas aŭ esti adheritaj de iu planedo kaj fali sur ĝin aŭ veni rekte aŭ malrekte en la sunon. La lasta glacio vaporigas sur la suno, kaj tiu vaporo forsprucante („sunmakulo“) fariĝas en la kosmo ree glacio, sed polvoforma, nomata malkruda glacio. Ankaŭ ĉi tiu havas multe da influo al la surtera vetero. Interesa estas la 11-jara periodo de la sunmakuloj, tera vetero, nordlumo, kiun da kaŭzas la planedo Jupitero.

La aspekto de la planedo laŭ la Glaci-kosmogonio estas tute alia, kiel oni ĝis nun kredis. Akvo kaj glacio ludas la plej gravan rolon, kion priskribi resuma artikolo ne permesas. Ankaŭ la superaĵo de la lumo estas grandega glacia oceano.

Sekve de la media rezisto mallarĝiĝas la vojoj de la planedo ĉirkaŭ la suno. Per tio la luno, antaŭe planedo, tiom proksimiĝis al la tero, kaj adherite ĝi fariĝis tera trabanto. Pli kaj pli mallarĝaj fariĝas ĝiaj ĉirkaŭiroj, fine ĝi falegis en multe da akvo-kaj ŝlimo-pluvegoj sur la teron. Ĝis nun oni diris, ke la luno estas ido del' tero, la Glaci-kosmogonio diras, ke ĝi antaŭe estis memstara planedo. Laŭ Hörbiger jam 3-4 aliaj lunoj havis la diritan sorton. La historio de tiuj lunoj katasirofoj estas skribita en la terkruono. Per la pli kaj pli alproksimiĝinta luno, la surteraj akvo kaj aero kunfluis en la ekvatoran parton. La polusoj preskaŭ senaeriĝis. La sekvo estis la diversaj glacipecoj. La akvo-al-kaj-forfluo detruis montarojn, konstruis aliloke kune kun la malvarmejo la tavolojnarojn. Simile fariĝis la karbominoj ktp. Pli detalan priskribon de tiu ĉi interesa ideo malebligas la necesa koncizeco. Fine ankaŭ nia luno finigos nian epokon per sia surteriĝo. La nova epoko unue estos senluna. Ĉu ĝin vidos ankoraŭ homa generacio, ni ne povas scii. La lasta luno de l' tero estiĝos la nuna Marso. Se ankaŭ ĝi estos surteriĝinta, ne plu povos esti homoj kaj teraj bestoj kaj floroj. Ĉar la Marso alportos tiom da akvo al la tero, ke ĝi altege ĝin ĉirkaŭos. Finfine trovos ankaŭ nia amata tero sian tombon en la suno.

Tiuj estas kelkaj pensoj de la Glaci-kosmogonio. Ili ne povas kompreneble konvinki, ĉar neniel ni povis en tiu mallonga formo ilin pravi kvenkam la tuta teorio bazas ne nur sur teoriaj revoj. Eble ili tamen iniciatas multajn personojn al plua meditado kaj studado.

Josef Schmid, Graz.

Historio.

William Penn (1644—1718).

Diroj de Penn.

Dum la Nürnberga Kongreso estas senpage disdonita Esperanta traduko de broŝuro verkita de nia morfinta samideano Sir Vezey Strong, Eksta Lord-Urbestro de London pri „Civitano William Penn“ kaj Esperantigita de s-o W. Bailey. Tamen, ĉar la nombro de la broŝuroj disponeblaj ne sufiĉis por la tuta kongresano, ni citas kelkajn el la saĝaj diroj de William Penn, por ke niaj legantoj povu almenaŭ konatiĝi kun la principoj, sur kiuj Penn fondis tiun civiton de fratamo, Filadelfio (Philadelphia), en ŝtato de Pennsilvanio, Ameriko (Usono).

Kiam oni diras al ni ke la ideoj pri bonfido kaj bonvolo estas utopiaj, kiam oni insistas ke la „mondo eterne militanta“ eterne daŭros milite, kaj neniam estos ebla la forigo de la nuna civilizita barbarismo, ni povas atenci al la fakto ke almenaŭ unufoje, la granda Eksperimento de la Paco, absoluta, senlima estas elpruvita kaj sukcesis.

William Penn heredis de sia patro Admiralo Sir William Penn la rajton al sumo de £ 16000 kiun ŝuldis la tiama Brita Registaro al la Admiralo. Anstataŭ tiu sumo William Penn konsentis ricevi grandan regionon en Ameriko, kie li povus elpruvi la principojn de regado, kiujn li pritraktis en Anglujo.

Jen kelkaj el liaj diroj:

„La opiniojn de la homoj oni devas tuŝi ne perforte, sed per rezonado.“

„Danĝera kaj absurda estas la ideo, ke, ĉar la homoj pensas malegale pri la estonta vivo, tial ili ne devas esti liberaj agi, trinki, dormi, marŝi, negoci, kaj pensi.“

„Nek grandaĵoj, nek bonaĵoj estas iam atingitaj sen amo kaj malfacilego.“

Unu tagon, renkontante George Fox, William Penn demandis lin: „Ĉu portis la glavon estas prave?“ George Fox respondis: „Portu ĝin tiel longan tempon kiel ci povas.“ Post ne longe ili denove renkontiĝis, kaj George Fox demandis:

Perfektigo de nia gazeto

nur estas ebla, se

kunlaborantoj el la tuta mondo

kunhelpas kaj

vidigas la universalecon de E. T.

Sendu al ni regule raportojn pri la movado, artikolojn el la praktiko kaj ĉiuj aliaj sferoj.

„Kie estas cia glavo?“ Penn respondis: „Mi sekvis cian konsilon: mi portis ĝin tiel longan tempon kiel mi povis.“

Naskita el la profesio milita Penn frue konsciis la simplan fakton, ke oni ne povus servi al sia frato mortigante lin.

Alveninte en sia nove-akirita provinco fine de oktobro 1682, li baldaŭ rendevuis kun la indianaj ĉefoj ĉe Ŝakamakson (poste nomita Kensington, apud Filadelfio) sub granda ulmo. Al tiuj li diris:

„La Granda Spirito regas en la ĉielo kaj sur la tero. Li scias la plej internajn pensojn de la homoj. Li scias, ke ni venis ĉi tien kun sincera deziro loĝi paco kun vi. Kontraŭ niaj malamikoj ni ne uzas batalilojn: bonfido kaj bonvolo estas niaj defendiloj. Ni kredas ke vi rilatos al ni amike kaj juste, kiel ni ankaŭ rilatos amike kaj juste al vi. Ni renkontiĝas sur la larĝa vojo de bonfido kaj bonvolo. Ĉe ambaŭ flankoj oni ne prenos superecon: Ĉio estos sincereco kaj amo.“

Poste li legis al ili la sekvan konvencion: „Ni estos fratoj, mia popolo kaj via popolo, kiel infanoj de unu Patro. Ĉiuj vojoj estos liberaj por la Kristanoj kaj la Indianoj. La poroj de la Kristanoj estos malfermaj por la Indianoj kaj la landoj de la Indianoj estos malfermaj por la Kristanoj.“

La fina solena promeso estis: „Ni transdonos ĉi tiun interligon al niaj infanoj. Ĝi estos farata ĉiam pli kaj pli forta, kaj konservata brila kaj pura, sen rusto kaj sen makulo, inter niaj infanoj, dum fluos la riveroj, kaj daŭros la suno, la luno kaj la steloj.“

Tiuj vortoj neniam povos morti. Kiam li estis junulo en Parizo, unu viro atakis lin pro supozita insulto.

Penn, armita laŭ la tiutempa moro, sin defendis kaj venkis la atakinton. Poste li permesis al ĉi tiu foriri sen vundo. Kelke da jaroj poste li diris:

„Kaj se li mortigus min, aŭ se mi, defendante min, mortigus lin, mi demandas iun ajn homon havantan prudenton aŭ konsciencon, ĉu la tuta rondo de ceremonio estus sufiĉa kompenso por la vivo de unu homo, se oni konsideras la dignecon de lia naturo kaj la gravecon de lia vivo rilate Dion, lian Kreinton, rilate lin mem, kaj rilate la bonon de civila societo?“

Malliberiĝite pro konscienco en la Turo de Londono, kaj sciigite ke li devas aŭ renegatiĝi aŭ morti en kapiteco, Penn kun decida mieno respondis:

„Pli volonte ol cedi, eĉ malmulte, mi faros mian karceron mia tombo, ĉar al-neniu homo mi ŝuldas konscienc-obeon.“

Pacifismo.

Universala Esperantista Pacifista Ligo.

Landorganizo Aŭstrio.

Dum la XV-a en Nürnberg U.E.P.L. estas refondita. Ĝi celas disvastiĝi la pacifismon en Esperantistaj randoj kaj Esperanton inter la pacifistoj de la tuta mondo. En la diversaj landoj laboras la en Nürnberg elektitaj ĉefkomisitoj kune kun komisitoj en kiom eble plej multaj urboj kaj lokoj. Pro tio mi kiel ĉefkomisito por Aŭstrio petas la gesamideanojn en tuta Aŭstrio kunlabori kun mi per porpacifistaj paroladoj, kunvenoj, fondo de pacifistaj sekcioj, kiel mi mem faros en la urbo Vieno. Mi petas la gelaboremojn, sendi al mi (kune kun resp. poŝtm.) nomon, adreson kaj regulajn raportojn, unue, por ke mi povu raportoj pri la pacifistaj progresoj en Aŭstrio

per „ET“, „Esperanto“ (Genève) kaj „AER“ (Aŭstria Esperanto-Raporto) kaj en nia nacia komunikilo „Die Neue Zeitung“ en Wien, kaj due, por ke la pacifista E.-centro por Aŭstrio sciigu ĉion necesan pro celkonscia laboro pororganiza.

Mi proponas krome, ke ni ĉiuj en la tuta mondo nin nomu estonte egale „ĉefkomisitoj“ anstataŭ ĉefdelegitoj, ĉar la esprimo „ĉefdelegito“ ne estas ĝusta rilate nian organizon. Ni ne estas delegitaj por la diversaj landoj, sed komisiitaj per la refondintoj de U.E.P.L., aranĝi ĉion por kaj en la nomo de la ligo. Nur post la efektiva fondiĝo de landorganizo ni rajtas nomigi „delegitaron“.

R. M. Frey,
Wien III, Bechardgasse 14.

Al ĉiuj en Nürnberg elektitaj komisitoj de U. E. P. L.

1. Kiu ne konsentas la supran proponon, bonvolu skribi al mi! Kiu ne skribas, iu konsentas!
2. En Nürnberg ni fondis la organizon „Universala Esperantista Pacifista Ligo“: en ET n-o 155 laŭ malkorekta raportoj erare estas skribita „Univ. Esperanto Pac. Ligo“, tio estas universala ligo de pacifistaj Esperantistoj.

La proponojn mi aprobas.

Prelato D-ro Alexander Giesswein,
Prezidanto de U. E. P. L.
Budapeŝt, VIII.; Szt. Kiraly ut. 28.

Geografio.

Etnografaj elementoj de loĝantaro en Ruslando.

| | |
|--|------------|
| 1. Grandrusoj | 71 545 615 |
| 2. Ukrainanoj | 23 584 289 |
| 3. Blankrusoj | 5 306 698 |
| 4. Poloj | 5 208 911 |
| 5. Aliaj Slavoj | 74 082 |
| 6. Litovoj | 44 911 |
| 7. Latvoj | 122 106 |
| 8. Romanoj | 297 158 |
| 9. Germanlandanoj | 1 120 453 |
| 10. Aliaj Germanoj | 9 785 |
| 11. Hebreoj | 2 728 272 |
| 12. Cruzinoj | 1 638 289 |
| 13. Grekoj | 249 716 |
| 14. Armenoj | 1 315 674 |
| 15. Persoj, Tadjikoj, Talŝoj k. Tatoj | 498 986 |
| 16. Kurdoj | 104 669 |
| 17. Osetoj | 212 787 |
| 18. Ciganoj | 35 019 |
| 19. Aliaj Indo-Eŭropanoj | 41 626 |
| 20. Kabardinoj | 112 495 |
| 21. Cerkesoj | 59 219 |
| 22. Abĥazoj | 78 799 |
| 23. Ĉeĉenoj | 266 880 |
| 24. Lezginoj | 734 979 |
| 25. Finoj | 118 028 |
| 26. Votjako | 476 046 |
| 27. Kareloj, Ĉudoj k. Iŝiroj | 257 012 |
| 28. Estonoj | 120 478 |
| 29. Zirjanoj | 198 897 |
| 30. Permiakoj | 144 619 |
| 31. Mordovoj | 110 783 |
| 32. Meroj | 409 164 |
| 33. Aliaj Finoj | 54 055 |
| 34. Tataroj | 514 167 |
| 35. Baŝkiroj, Meŝĉerjakoj k. Tentjaroj | 1 767 714 |
| 36. Ĉuvaŝoj | 808 467 |
| 37. Karadžaveloj, Kumikoj k. Nogajoj | 149 955 |
| 38. Tjurkoj, Karanalahoj | 170 938 |
| 39. Turkmenoj | 301 181 |
| 40. Kirgizoj | 5 561 444 |
| 41. Sarto | 2 265 999 |
| 42. Uzbekoj | 453 808 |
| 43. Jakuloj | 344 141 |
| 44. Aliaj Tjurko-Tataroj | 705 072 |
| 45. Kalmikoj | 128 585 |
| 46. Burjatoj | 213 720 |
| 47. Aliaj Mongolo-Burjatoj | 1078 |
| 48. Koreanoj, Japanoj, Tunguzoj | 46 541 |
| 49. Hiperboreanoj | 67 606 |
| 50. Aliaj | 174 896 |

Enfute 129 657 277

Filatelio.

Grava sciigo por filatelistoj.

Laŭ informo de la poŝticejo en Kazani. Sen speciala permeso de Filatelia Fako de Komisarjejo de Poŝto kaj Telegrafo en Moskva estas malpermesate, sendi poŝtmarkojn el Rusujo en eksterlandon. La vendado de rusaj poŝtmarkoj okazas ekskluzive per Komitato de Helpe al Malsatantoj je profito de la kaso de tiu organizajo. Do filatelistoj intersangantaj poŝtmarkojn kun Rusujo ne kulpigu rusajn samideanojn, se ili ne ricevas poŝtmarkojn responde al iliaj sendaĵoj.

H. Frank.

Internacia Sporto.

Aviado.

Franca aviadisto Sad Leconte starigis novan mondrekordon en altflugo de 10741 metroj.

Amerika marista aviadisto Sanderson starigis novan rekordon en rapidflugo, transfluginte en unu horo 238 mejlojn.

Naĝado.

La amerika naĝisto Charles Toth tranaĝis la Kanalon en 16 horoj kaj 54 minutoj.

Parolejo.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas fojle presataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redaktoro tamen ne prenas sur sin unu respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi neŝatigajn artikolojn.

205. Rilatas al 200.

Klare! La Fundamento de Esperanto per la 15-a regulo permesas la liberan uzon de vortoj, kiujn la plejmulto de lingvoj ĉerpis el komuna fonto. Alia nulgiga regulo en tiu libro ne ekzistas. La antaŭparolo sole klarigas la manieron de ĉi tiu ĉerpo kaj efektive ĝin plivalorigas.

Do s-o B. povis antaŭvidi ke, laŭ tio, li mem devas esti konsiderata malamiko kaj perfidulo de Esperanto kaj plue de siaj kolegoj.

En ĉi tiu regulo konsistis nedetruibla scienca bazo, sur kiu povas elstari la plej kolosa konstruaĵo, kondiĉe ke la muroj estu ĉiam masonataj per bona ŝtono cementata per identa bama kalko.

Nenia danĝera veneno, el la plej ampleksa aplikoj de ĉi tiu regulo, sed plej grava damaĝo konfuzo venas jam el nekomprene de ĉi tiu esenco, t. e. ke ĉi tiu vorto devas esti prenata el la komuna fonto de la internacieco kaj uzata senŝanĝe alprenante nur Esperantan graŝon.

Ekzkluzive naciaj vortoj estas absolute domandindaj se ili ne estas necesaj kaj ne antaŭatubaj per internecialo.

Sole du distingaj signoj estas necesaj en vortaro: unu por nur Esperantaj vortoj, la alia por la internecialo de kiu ajn uzataj kaj uzablaj.

Se vorto troviĝas en „Hense's Fremdwörterbuch“, precipe se presita per gotika; literoj, ĝi estas interneciala konata.

Tiele senescepte ĉiuj klare interkompreniĝos, kaj la lingvo povos naturevolvi disfalante en nenia dialekto. Kial s-o B. ne plendis por malobeo al ĉi tiu regulo antaŭatubaj hazardiĝi la pioniron Christaller?

Prof. G. Meazzini, L. K. San Giovanni Valdarno (Ital.)

206. Rilatas al 200.

Sajnas al mi, ke s-o B. juĝas iom tro severe. Li estas prava, dirante, ke ĉefe interese en vortaro estas la „aldonitaj malgrandaj signoj“, kiuj montras, ke la radiko aŭ formo estas enkondukita de nia Majstro aŭ oficialigita de la L. K. Sed li eraras, asertante, ke „ĉiujn aliejn kreintojn de vortoj li konsideras kiel malamikojn kaj perfidulojn al nia lingva afero“. S-o B. certe ne konsideris, ke nia Majstro estas morta, kaj ke la L. K. povas nur aprobi aŭ ne aprobi, nur oficialigi aŭ ne oficialigi vortojn resp. radikojn, kiuj estas uzataj (en nia literaturo). Se do — laŭ la ideo de s-o B. — neniu verkisto ŭzus novajn vortojn, neniu nova vorto povus esti oficialigata de la L. K., kaj nia lingvo ŝtoniĝus.

Ĉi verkisto rajtas uzi neologismojn, se laŭ lia opinio ne ekzistas jam malnova vorto por la celata ideo. Do alia demando estas: ĉu tiu aŭ tiu neologismo estas vere necesa? Tiu demando ne kapablas pruliĝi kaj respondi tiu Esperantisto, kaj tial estas bona ideo de Christaller, signe aldoni la nomon de la unua aŭ ĉefa uzinto de neologismo. Se la uzanto de la vortaro vidas, ke vorto, kiu li trovas, estas uzata kaj akcive rekomendata de ekz. s-o Grosjean-Maupin la Direktoro de la Sekcio por la Komuna Vortaro, li tuj vidas, ke li bone povas apliki la vorton. Aŭ se alian uzinton de neologismo por la sama ideo li kredas pli kompetenta, li uzu ties rekomenditejon. Kaj tial, iom post iom, tiu radiko estos uzata plej ofte, kiu estas rekomendata de tiu verkisto, kiu estas plej kompetenta laŭ la opinio de la plejmulto de la Esperantistaro, kaj ĉar la L. K. oficialigos la neologismojn plej ofte uzatan, ĉiam la plej taŭga vorto oficialiĝos. Jen la vojo proponita de nia Majstro.

207. Rilatas al 192.

La danĝera epidemio, kiun tre prave bedaŭras s-o D., estas en efektiveco malnova, ne nova, kiel li kredas, sed ĝi de post du aŭ tri jaroj terure intensiĝas kaj iĝas ege malrakonkordiga. Jam de longe multaj plej aŭtoritataj voĉoj, kaj Zamenhof mem, protestis laŭte kaj energie, sed ĉiam vane, kontraŭ la arbitra kaj nesingardema enkonduko de neologismoj. Tute prave s-o D. diras: „Se iu verkisto deziras uzi novajn vortojn, li devas antaŭe sian turni al L. K.“ La samon jam antaŭ multaj jaroj ripete kaj insiste admonis Zamenhof, ripete kaj insiste konsilis la Lingvaj Institutioj, ripete kaj insiste postulis multnombraj eminentaj Esperantistoj; kaj s-o D. facile konvinkigis pri tio, se li bonvolos relegi, aŭ legi, la Akademian Deklaracion de decembro 1920 (kiu mi tre volonte sendus al li, se mi konus lian adreson) kaj la Raporton de la Akademia Sekcio por Komuna Vortaro publikitan en ET n-o 48 (4. sept. 1921).

Sed la L. K. povas respondi nur, se oni demandas ĝin; ĝi povas plenumi sian taskon nur, se ĉiuj verkantoj, redaktantoj kaj recenzantoj helpas aŭ ĝin, uzadante al si memvolan disciplinon kaj konsultante ĝin antaŭ ol presigi verkovon, en kiujn ili enkondukas novajn radikojn. La Lingvaj Institutioj konscias sian devon; ĉu ĉiuj Esperantistoj konscias la sian?

La vorto VANDO ne estas tiel juna, kiel Sajnas kredi s-o D.: mi jam registris ĝin dum la jaro 1905. Ni plie posedas, ne enkalkulante la Fundamentan radikon MUR, la samsignifajn radikojn PARI (almenaŭ tiel maljuna kiel VAND), PARIET kaj SEPT. Ni ĝoju do: ni estas riĉaj; sed ĉu la amatoroj de novaj vortoj estas certaj, ke ĉi tiu riĉeco varbos al ni multajn adektojn kaj kuraĝigos la komencantojn?

Prof. E. Grosjean-Maupin Direktoro de la Ak. Sekcio p. Kom. Vortaro 14, Rue du Val d'Osne, Saint-Maurice (Seine).

208. Ne jam, ne ankoraŭ.

(Rilatas al 201.)

La demando estas tre simple solvenda, sed la rezonado de s-o Andrej estas erara. Se en la Fundamento nenie ni trovas esprimojn „ne ankoraŭ“, „ne jam“, tio ne pravas, ke ĉi tiuj esprimoj estas malkorektaĵoj, kaj la ĉiujaj frazoj nur pravas, ke ĉar ili troviĝas en la Fundamento, ili estas ĝustaj. Sed fakte estas, ke „ne ankoraŭ“ havas tute alian signifon ol „ankoraŭ ne“, kaj ke „jam ne“ estas tute alia afero ol „ne jam“.

La vorto „ne“ ĉiam staru antaŭ tiu vorto, kiun oni volas nei: „La infano jam ne ploras“ esprimas, ke la infano jam estas en la stato de neplorado, t. s. ke la infano antaŭe ploris, kaj jam ne ploras.

Tiu sama ideo estas esprimebla per „la infano ne ankoraŭ ploras“, ĉar „la infano ankoraŭ ploras“ signifas, ke la infano antaŭe ploris kaj ankoraŭ ploras. Kaj se tiu ankoraŭ plorado estu neita, la infano „ne ankoraŭ ploras“ = jam ne ploras. Sed „la infano ankoraŭ ne ploras“ esprimas, ke la infano estas ankoraŭ en stato de neplorado, t. s. ke la infano faras la impreson, ke ĝi verŝajne tuj ploros, sed ĝis nun (= ankoraŭ) ĝi ne ploras.

Se iu gardas la alian kontraŭ iu kaj ne sin, li ne sin gardas. Sed se iu ja ne serĉas la danĝeron sed ankaŭ ne gardas sin kontraŭ ĝi, li sin ne gardas.

Se mi fimas, ke jam pasis la momento, en kiu mi estus povinta trovi ion serĉatan, mi fimas, ke mi jam ne trovas; sed se mi fimas, ke ne estas eble, ke mi jam trovos la serĉitaĵon, mi fimas, ke mi ne jam trovos ĝin.

Antaŭ „ĉ“ ne povas stari la vorto „ne“, ĉar „ĉ“ ne povas esti neata, kaj tial ankaŭ mi opinias, ke la frazo „Vladimir diris, ne ĉu unu vorton plu“ („Tri Noveloj“ de Puŝkin, trad. D-ro Fiŝer, „Internacia Mondliteraturo“ vol. 10, pg. 45) estas nemodela kaj devas teksti „Vladimir diris ĉu ne unu vorton plu“.

Karl Minor, L. K.

Gesamideanoj hebreoj!

Por definitive decidi pri la plua ekzistado kaj agado de Tutmonda Esperantista Hebrea Asocio, okazos la 30-an de septembro de k. j. unutaga Konferenco de TEHA en Czeŝtoĥova (Pol.).

Konsiderante la mallongan tempospacon restantan ĝis la Konferenco kaj ke eksterlandaj samideanoj ne sukcesos veni, ni tial turnas nin kun insistita peto al ĉiuj pollandaj TEHA-anoj kaj simpatiantoj, kiuj deziras ĉeesti la Konferencon, ke ili abale sciigu tion al la ĝenerala sekretario.

Samtempe ni esprimas al ĉiuj hebreaj Esperantistoj plej korajn bondezirajn okaze de Novembro 3684.

Centra Komitato: Isralo Leizeroviĉ, ĝen. sek. Lódz (Polio), Kilińskięto 28.

Negocaj informoj.

S-o Herm. Hch. Thörner, Buerschestrasse 11, Osnabrück (Germanujo), mestara komercisto, deziras interrilati kun eksterlandaj interesatoj por eksporti ĉiusepacajn germanajn produktojn. Ni rekomendas lian anoncon en la hodiaŭa numero al la atento de niaj legantoj.

Ĉu vi amas arton kaj literaturon? Abonu tuj la revuon „Literatura Mondo“ Andrassy út. 81 Budapeŝt VI. La malnovaj abonantoj estas petataj renovigi siajn abonojn.

Direktil-tenilojn el celuloido por bicikloj liveras en bona kvalito Hermann Heinrich Thörner Buerschestrasse 11, Osnabrück (Germanujo).

Komercaj komisioj de ĉiu speco estas akceptataj de Agentejo Finke & Eckert, Roonstrasse 17, Wilhelmshaven (Germanujo).

Fervendistoj! Ferfabrikejoj! Kiu bezonas ilojn kaj maŝinojn por la prilaborado de metaloj? Malmultekoste kaj bone! Bonvolu peti informojn de Walter Freygang, Weinböhla i. Sa.

Fumu La Esperanto-Cigaredojn „Tutmonda Esperanto“ „La verda stelo.“ Cigaredomanufakturo Antehmo, Zittau (Saks.)

Anoncetoj.

Konforme al la nova poŝtaranĝo germana anoncetoj

el Germanujo

por minimume dufoje enpresu laŭ niaj tarif-kondiĉoj kostas por

abonantoj fund. prezon de mk 1. — X ŝlosilnombro neabonantoj fund. prezon de mk 1.60 X ŝlosilnombro.

Ni petas pri nepra atento ĝe niaj kondiĉoj. Pri domaĝoj kaŭzitiaj per neatento suferas la mendanto.

Anoncetoj.

MI DEZIRAS AĈETI aŭ interŝanĝi je ekz. de „Sinjoro Tadeo“ de Mickiewicz-Grabowski, „Esperanto Triumfonta“ n-oj 104, 141. Sendu proponojn al Włodzimierz Pfeiffer, Księgarnia Fizjera, Łódź, Polujo. [2]

INFORMPETO. Mi trege deziras informon pri la sorto aŭ nuntempa adreso de s-o Ottokar Randau el Turnov (aŭ Turnau), Ĉeĥosl., dum milito aŭstria artilleria oficiro (antaŭe studento de Praha), militkapitano en Astrahan 1915-1918. Oni bonvolu sian turni al C. A. Hvorslev, del. de UEA, Hvítfeldisg. 2, Aarhus, Danujo. Poŝtispeszon mi rekomencos. [2]

VENDO DE POŝTMARKOJ! Po pakajlo de 100 hungaraj poŝtmarkoj diversaj el jaroj 1910-20 mi sendas en granda kvanto laŭ interkonsentita prezo. Pli malgrandan kvanton en egalvaloro de hung. kr. 1100 en la ajn mono. Mi respondas nur por mono sendita en rekomendita letero aŭ per banko. Konto de la Nacia Kreditinstituto A. S. Nemzeli Hiteel-inszést. r. l., provinca filio, Budapest 8, Rákóczi-ut. 9. Korespondon per lingvoj Esperanta, germana eble franca. Hungara Poŝtmarko Vándy kaj Interŝanĝa Komercisto Esperantista Zoltán Balázs, Tápiószel, Hungarujo. [2]

GRAVA POR MUZIKISTOJ KAJ INSTRUISTOJ! Aranĝo de novaj kaj malnovaj violonĉeloj je perfektaj so nstrumentoj laŭ propra brile priuĝita eltrovo (ankaŭ novaj violonĉeloj estas prezinde vendotaj). Respondu nur kontraŭ 2 resp.-kup. E. F. Strenger, Zuffenhausen-Stgt., Königstr. 22, Wtbg., Germ. [2]

LINJARANGAJN VINOJN de Rejno kaj Moselo, ankaŭ saŭmajn vinojn vi aĉetas profitige ĉe: Alenkirch-Eccard Nachf., Mainz, Reprezentanto: Peter Becker, del. de U. E. A. en Mainz (Germ.) Augustinerstr. 58. [2]

ANGLA MONO PAGOTA (GRANDA SUMO) por ekzemplero de OSTRONIERAJ TESTAMENTOJ EN RUSA LINGVO, La Vostokov au faksimilo. Skribu al HIRST, 19 Lion Chambers, Huddersfield, Anglujo. [5]

Korespondoj kaj interŝanĝo.

S-o Max Pflug, Plauen (Vgld.), Germ., Querstr. 7, deziras korespondi per l. kaj pk. il. [2]

S-o Albert Ofen en Schwabach, Germ., deziras korespondi kaj interŝanĝi pk. il. kaj papermonon kun ĉiuj landoj. [2]

S-o Emil Brunner, Turn-Teplitz, Kulmerstr. 141, Ĉeĥosl., deziras korespondon kun ĉiulandaj gesamideanoj per pk. il. (bfl.) kaj l. [2]

Fraŭlino, 18-jara, deziras korespondi per pk. il. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj, Interŝanĝo Esperantistojn kaj pm. F-ino Pejička Blazkova, Chabrovice, p. Planá n. L., Ĉeĥosl. [2]

S-o Franz Kolář, Steyr, Wieserfeldpl. 32, Aŭst., deziras korespondi per pk. il. kun ĉiuj landoj. Interŝanĝas ankaŭ pm. [2]

S-o Ernst Schreiber, Jajloro, Wittenberge (Bez. Potsdam) Packhofstr. 1 b, Germ., deziras korespondi per l. kaj pk. il. (bfl.) interŝanĝas pm. kaj papermonon. Bona interŝanĝo Respondas al ĉiuj. [2]

Mi deziras korespondi per pk. il. kaj interŝanĝas portretojn kaj urbmohon. Marie Schreiber, Packhofstr. 1 b, Wittenberge, Germ. [2]

S-o Otto Lüders, Baekerstr. 17/II, Wittenberge, Germanujo, deziras korespondi kun tuta mondo kaj interŝanĝas kun ĉiuj. [2]

S-o Alfred Milatz, Bürgerstr. 21, Wittenberge (Bez. Potsdam), Germ., deziras korespondi kaj interŝanĝas kun Esperantistoj de la tuta mondo. [2]

S-o Josef Fleischer, Lotte-Mariengrube, Schwaz, Ĉeĥosl., deziras korespondi kun la tuta mondo per pk. il. kaj l.; interŝanĝas ankaŭ pm. [2]

S-o Max Linke, Moritzstr. 55/II, Breslau 7, Germ., deziras interŝanĝi pk. il. kun aliaj landoj. [2]

F-ino Flora André, Nygård i, Sandviken, Svedujo, deziras korespondi per pk. [2]

S-o Alfred Sower, Antsla, Estonio, deziras korespondi kun komercistoj pri importo de diversaj komercaĵoj el ĉiuj landoj. [2]

S-o H. Teer, Noorddijk 32, Wormerveer, Holando, deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn kun gesamideanoj en la tuta mondo. [2]

Turka samideano Ibrahim M. Ferikov, Tirnovo, Bulgariujo, deziras korespondi per pk. il. kaj l. kun gesamideanoj de tuta mondo (preferas aziajn landojn). [2]

S-o J. D. Kelderman, Graven 12, Deventer, Holando, deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj per l. kaj pk., ankaŭ interŝanĝi pk. il. Mi petas leĝeban adreson. [2]

Aleksander Kemeny, Mako, Hungarujo, deziras korespondi per leteroj pri ĉiuj temoj (precipe pri muziko) kun ĉiulandaj samideanoj el ĉiu parto de la terĝlobo. Nepre respondas. [2]

F-ino Manjo Bastlova, Sl. Ostrava 955 (Ĉeĥoslovakio) deziras interŝanĝi pk. bildf. afrank. kun ĉiuj landoj. [1]

Interŝanĝo de poŝtmarkoj pogrando (5-20 pecoj de unu speco) ankaŭ sur folioj kun ĉiuj landoj. Fuŝosendaĵoj malakceptataj. Bazo Yoert, Senf ktp. S-o Jan Bastil, Sl. Ostrava 955, Ĉeĥoslovakio. [1]

180 fervoregaj novuloj de fondita grupo deziras interŝanĝi il. pk., pm. ktp. kun ĉiuj landoj de la tuta mondo. Adreso: Gruepstro Leo Fielder, Schillerstr. 15, III, en Breslau 13 (Germ.). [1]

Mi korespondas kun la tuta mondo per il. pk. (naturvidaĵoj), interŝanĝas pm. kaj papermonon. Adreso: s-o Stan. Dzius, en Kielce (Pol.) Staro-Zagranska 35, m. l. [1]

Filatelistoj! Por 2 sviz. fr. aŭ egala valoro mi sendas 50 div. maloftajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig. Interŝanĝas pm. Oskar Köhler, Ölsnitz i. Vgld., Bergstr. 5. [1]

Poŝtmarkojn el orientaj landoj vi plej malrare aĉetas ĉe Eldonejo „Esperantista Voĉo“, en Jasio (Pollando). Ni sendas pm.-elektojn kontraŭ bonaj referencoj aŭ mondepono. Interŝanĝas pogrando; fuŝosendaĵoj malakceptataj. [1]